HISPANUJO

# ESPERANTISTA HIMNO

PREĜO SUB LA VERDA STANDARDO

DEDIĈITA

AL LA VI.ᴬ HISPANA KONGRESO DE

# ESPERANTO

★

POEMO DE D-RO ZAMENHOF
(AŬTORO DE ESPERANTO)
MUZIKO DE JOZEFO SEVA

ESTAS PROPRAĴO
DE LA AŬTORO
DE LA MUZIKO

MADRIDO
1926

PREZO:
2
PESETOJN

# Esperantista Himno

## "PREĜO SUB LA VERDA STANDARDO"

Poemo de L. L. ZAMENHOF

Muziko de JOZEFO SEVA






Al Vi, ho potenca senkorpa mistero,
Fortego, la mondon reganta,
Al Vi, granda fonto de l'amo kaj vero
Kaj fonto de vivo konstanta,
Al Vi, kiun ĉiuj malsame prezentas,
Sed ĉiuj egale en koro vin sentas,
Al Vi, kiu kreas, al Vi kiu reĝas.
Hodiaŭ ni preĝas.

Al Vi ni ne venas kun kredo nacia,
Kun dogmoj de blinda fervoro;
Silentas nun ĉiu disput' religia
Kaj regas nur kredo de *koro,*
Kun ĝi, kiu estas ĉe ĉiuj egala,
Kun ĝi la plej vera, sen trudo batala,
Ni staras nun, filoj de l'tuta homaro
Ĉe Via altaro.

Homaron Vi kreis perfekte kaj bele,
Sed ĝi sin dividis batale;
Popolo popolon atakas kruele,
Frat' fraton atakas ŝacale.

Ho, kiu ajn estas vi, forto mistera,
Aŭskultu la voĉon de l'preĝo sincera,
Redonu la pacon al la infanaro
De l'granda homaro.

Ni ĵuris labori, ni ĵuris batali,
Por reunuigi l'homaron.
Subtenu nin, Forto, ne lasu nin fali,
Sed lasu nin venki la baron;
Donacu Vi benon al nia laboro
Donacu Vi forton al nia fervoro,
Ke ĉiam ni kontraŭ atakoj sovaĝaj
Nin tenu kuraĝaj.

La verdan standardon tre alte ni tenos;
Ĝi signas la bonon kaj belon,
La Forto mistera de l'mondo nin benos.
Kaj nian atingos ni celon.
Ni inter popoloj la murojn detruos,
Kaj ili ekkrakos kaj ili ekbruos
Kaj falos por ĉiam, kaj amo kaj vero
Ekregos sur tero.

L. ZAMENHOF

# ARANGOJ POR LA KANTO

II.ª Strofo: Ni staras nun filoj, filoj de l'tuta homaro,

Aro, ĉe via altaro, ĉe via altaro, altaro, altaro, altaro,

III.ª : Redonu la pacon, pacon, al la infanaro,

Aro, de l'granda homaro, de l'granda homaro, homaro,
(homaro, homaro.

IV.ª : Ke ĉiam ni kontraŭ, kontraŭ, atakoj sovaĝaj

Ĉiam, nin tenu kuraĝaj, nin tenu kuraĝaj, kuraĝaj, kuraĝaj,
(kuraĝaj,

V.ª : Kaj falos por ĉiam, ĉiam, kaj amo kaj vero

Ĉiam ekregos sur tero, ekregos sur tero, sur tero, sur tero,
(sur tero.